

Martiraktoj

El la Latina tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Enhavo:

Enkonduko

Martirakto de Simforosa kaj ŝiaj sep filoj

Martirakto de Akacio, episkopo de Antioĥio en Pisidio

Prokonsula akto de Maksimo

Martirakto de Luciano kaj Marciano

Prokonsula Akto pri Cipriano

Martirakto de Julio

Interrete (originalaj Latinaj tekstoj):

Simforosa:

https://books.google.de/books?id=CAJ6ReOh_zYC&pg=PA3&hl=de&source=gbs_toc_r&cad=3#v=onepage&q&f=false

Akacio:

nenio trovita

Maksimo:

nenio trovita

Luciano kaj Marciano:

nenio trovita

Cipriano:

nenio trovita

Julio:

nenio trovita

Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-02

Martiraktoj

Passiones

Enkonduko

Lokaj kristanoj, kiuj aŭ per fuĝo aŭ alimaniere evitis arestiĝon, ofte post ĉeso de la persekutado kolektis koncernajn atestaĵojn. Kutime ĉe ĉiujara memorigado oni uzis tiajn tekstojn. Sur tomboj de martiroj ofte poste estis konstruitaj preĝejoj; plej fama fariĝis la *Sankta Petro* sur la tradicia loko, kie martire mortis Petro en la cirko de Nerono, ĉe la Vatikana monteto. Novaj generacioj ne nur honoris la martire mortintojn, sed ankaŭ homojn kiuj ja donis kredateston fronte al Romiaj funkciuloj sed iel kvazaŭ hazarde postvivis tion. Ilin oni nomis *konfesintoj*: confessores. De tio evoluis la kristana kultado de sanktuloj.

Se oni legas unu post aliajn tutan serion da martiraktoj aŭ -atestaĵoj, foje oni povas ricevi la impreson, ke certaj martiroj ne estis mense tute sanaj: kelkaj ŝajne ĉiurimede strebis al la morto martira, aliaj tute intence provokis aŭ insultis la prokurorojn aŭ aliajn juĝistojn por eldiri sian verdikton. Fama ekzemplo de tia ekzaltita sinteno estis la juna Origeno: okaze de kristan-persekutado li intencis prezenti ankaŭ sin mem kiel martiron, sed la patrino malhelpis tion, forkaŝante liajn vestaĵojn kaj tuta nuda kuri surstraten por iĝi martiro, tion Origeno ne kredis inda. Do li pluvis kaj povis fariĝi la granda teologo kiu li fariĝis.

Por iom doni impreson pri la bunteco de tiu ĝenro, ni prezentas kelkajn tekstojn ĉi-sube. Kompreneble en la Greka ekzistas pli da martiraktoj ol en la Latina.

Iom frua ekzemplo de martirakto:

La martiriĝo de Simforosa kaj ŝiaj sep filoj temas pri sceno okaze de la konstruado de la fama vilao de imperiestro Hadriano en Tibur (nuna Tivoli) inter 126 kaj 134 p. Kr.

La dediĉado de la vilao al la Dioj devas datiĝi de unu el la lastaj jaroj de l' imperiestro; arkeologiaj trovaĵoj konfirmas kelkajn detalojn el ĉi raportaĵo. Kompreneble pluraj vidas en ĉi rakonto iun eĥon al la martiriĝo de Juda patrino kaj ŝiaj sep filoj, kiel rakontita en kelkaj libroj *Makabeoj* el la *Duakanonaj Libroj* volumoj 1 + 3. sed estas sufiĉe da malsamecoj por kredi ke temas pri malsimilaj historioj.

Ekzistas tradicio, ke la aktojn de la martiriĝo redaktis Seksto Julio Afrikano (*Sextus Iulius Africanus*, fine de la 2a / komence de la 3a jarcento¹), aŭtoro, kiun tre estimis Eŭsebio de Cesarea, sed ĉu tiu aserto baziĝas sur vero, ne estas certe.

¹ Suidas, alinome Suda (Σοῦδα), estas ampleksa Bizanca enciklopedia vortaro el la 10-a jc. kun ĉ 30.000 eroj. Dumlonge oni atribuis ĝin al unusola aŭtoro Suidas (Suda), sed nun oni ofte pensas ke ĝi estas Bizanca vorto kun la senco *Fortikaĵo* aŭ simile. Temas pri speco de enciklopedio pri la Klasika Epoko. En ĝi oni i. a. legas pri Seksto Julio Afrikano, ke li estis devene Libia filozofa, kristana vojaĝanto kaj historiisto, kiu grave influis Eŭsebion kaj multajn aliajn historiistojn.

Martirakto de Simforosa kaj ŝiaj sep filoj:

1 Kiam Hadriano konstruis palacon kaj tion volis dediĉi laŭ sia malpia rito, kaj ekpetis orakolojn pere de oferoj al idoloj kaj demonoj, kiuj loĝis en la idoloj, tiuj respondis kaj diris:

Vidvino Simforosa kune kun siaj sep filoj ĉiutage damaĝas nin, alvokante sian Dion. Do se ŝi, kune kun la filoj, oferos al ni, ni promesas doni al vi ĉion, kion vi petas.

Tiam Hadriano ordonis aresti ŝin kun la filoj, kaj per flataj diraĵoj li instigis ŝin, ke ŝi konsentu oferi al la idoloj.

Sankta Simforosa diris: Mia edzo Getulio, kiu kun sia frato Amatio estis viaj tribunusoj, ambaŭ suferis diversajn torturaĵojn pro la nomo de Kristo, por eviti oferadon al la idoloj, kaj kiel bonaj atletoj ili venkis la demonojn per sia morto. Ili ja preferis esti senkapigitaj ol esti venkitaj, kaj suferante la morton, kiun pro Kristo ili akceptis, inter homoj ĉi-teraj ili eble akiris malhonoron, sed inter anĝeloj eternan estimon kaj gloron: Inter tiuj nun ili paŝadas, kaj kun la trofeoj de sia pasiono ĉe la eterna Reĝo ili ĝuas la eternan vivon en la ĉielo.

2 Imperiestro Hadriano diris al sankta Simforosa: Ofere kune kun viaj filoj al la ĉiopovaj Dioj, aŭ mi igos oferi vin mem kune kun la filoj.

Sankta Simforosa respondis: De kie venas tia boneco, ke mi meritus kune kun miaj filoj esti oferata al Dio?

Imperiestro Hadriano diris: Mi lasos vin oferi al miaj Dioj.

Sankta Simforosa respondis: Viaj Dioj ne povas akcepti min kiel oferon: Sed se mi estos bruligita pro la nomo de mia Dio Kristo, mi prefere forbruligos viajn demonojn.

Imperiestro Hadriano diris. Elektu unu el ambaŭ: aŭ oferu al miaj Dioj, aŭ vi terure pereos.

Sankta Simforosa respondis: Vi kredas, ke mia animo povas ŝanĝiĝi pro iu timigo, sed mi esperas trovi kvieton ĉe mia edzo Getulio, kiun vi pro la nomo de Kristo mortigis.

Tiam imperiestro Hadriano ordonis konduki ŝin al la sanktejo de Herkulo, kaj unue bati ŝin tie per vangofrapoj, poste pendigi ŝin je la haroj. Sed kiam neniamaniere kaj per neniuj timigoj li povis forigi ŝin de ŝia bona sinteno, li ordonis ligi ŝian kolon al grandega ŝtono kaj ĵeti ŝin en riveron. Ŝia frato Eŭgenio, gravulo de la kurio de Tibur, eltrenis ŝian korpon kaj enterigis ĝin en periferia kvartalo de la urbo.

3 Sekvatage tamen imperiestro Hadriano ordonis, ke ĉiujn ŝiajn sep filojn oni prezentu al li. Kiam li invitis ilin oferi al la idoloj, kaj konstatis, ke neniamaniere ŝajne kaj per neniuj timigoj li povos konsentigi ilin, li ordonis ĉirkaŭ la templo de Herkulo starigi sep palisojn, kaj per puliaro elstreĉi ilin tie. Unue li lasis tratanĉi la gorgon al Krescento; due trapiki la bruston al Juliano; trie mortpiki Nemesion en la koro; kvare vundi Primitivon per la umbiliko; kvine glave trapiki dedorse Justinon; sese flanke tranĉi Strakteon; sepe Eŭgenion fendi de supre suben.

4 Sekvatage imperiestro Hadriano venis al la sanktejo de Herkulo, kaj li lasis forpreni iliajn korpojn kaj meti en profundan kavaĵon, kaj la pontifikoj donis al tiu loko la nomon *La sep ekzekutitoj*. Post tio la persekutado ripozis unu jaron kaj ses monatojn; en tiu tempo la sanktaj korpoj de ĉiuj martiroj estis honorataj: oni konstruis tombojn kaj zorge enterigis ilin, ĉar iliaj nomoj estas notitaj en la libro de la vivo.

La naskiĝdato² tamen de ĉi sanktaj martiroj de Kristo, Simforosa kaj ŝiaj sep filoj, Krescento, Juliano, Nemesio, Primitivo, Justino, Strakteo kaj

² Ĉe martiro oni celebras la «naskiĝdaton» en la ĉielo = la mortodaton surteran.

Eŭgenio, estas celebrata la 15an antaŭ la kalendoj de aŭgusto³. Iliaj korpoj ripozas apud la *Via Tiburtina*⁴ ĉe la oka mejloŝtono de Romo, dum la regado de nia Sinjoro Jesuo Kristo, al kiu estas honoro kaj gloro en la jarcentojn de l' jarcentoj. Amen.

³ la 17an de julio.

⁴ Romia vojo al Romo.

Kelkaj martiraktoj el la tempo de Decio

Tiu ĉi martiakto montras imperiestron Decio en iom neatendata lumo: leginte la tekston, Decio devas ridi – li ne montras sin la monstro, kiun el li kreis multaj kristanoj.

*Martirakto de Akacio, episkopo de Antioĥio en Pisidio*⁵

1 Ĉiufoje kiam ni memorigas pri la gloraj faroj de l' servantoj de Dio, ni dankas al Li, kiu subtenis la suferanton dum la penado kaj kronis la venkinton en gloro.

Konsula reprezentanto Marciano, malamiko de la leĝo kristana, promociite de imperiestro Decio, igis venigi al si Akacion, pri kiu li aŭdis, ke li estas certa ŝildo kaj defendanto de tiu religio. Kiam li alvenis, li diris. Vi devas ami niajn princojn, ĉar vi vivas laŭ la leĝoj de l' Romia Imperio.

Akacio respondis: Al kiu la imperiestro estas tiel kor-proksima, aŭ de kiu li estas tiel amata kiel de ni? Ĉar senhalta kaj senfina estas nia preĝado pri li, ke en ĉi taglumo li longtempe vivu, regu la popolon per justa potenco, havu kiel eble plej firman pacon tra la tuta imperio, kaj krome ni preĝas pri la saviĝo de l' soldatoj, pri la stato de la Urbo kaj de la tuta mondo.

Marciano diris: Tion ankaŭ mi entuziasme laŭdas; sed por ke la imperiestro agnosku pli tutece vian obeemon, plenumu kune kun ni oferon al li.

⁵ Alia – multe malpli granda – urbo ol la famega Antioĥio en Sirio. Akacio – Latine *Acacius*.

Akacio diris. Mian Dion, kiu estas vera kaj granda, mi priĵuras por la sano de la reganto, sed oferon li ne povas postuli kaj mi ne rajtas doni: kiu ja plenumas oferadon al homo?

Marciano respondis: Al kiu Dio vi do verŝas viajn preĝojn, por ke ankaŭ ni plenumu niajn oferaĵojn?

Akacio diris: Mi deziras, ke vi sciu, ke ankaŭ al vi estas avantaĝe ekkoni la Dion, kiu estas vera.

Marciano respondis: Diru al mi lian nomon.

Akacio diris: La Dio de Abraham, Dio de Isaak, Dio de Jakob⁶.

Marciano diris: Ĉu tio estas la nomoj de Dioj?

Akacio diris: Ne: sed li parolis al ili, li mem estas la vera Dio, tiun ni devas respekti.

Marciano diris. Kiu li estas?

Akacio respondis: La Plejalta Adonai, kiu sidas super keruboj kaj serafoj.

Marciano diris: Kio estas keruboj kaj serafoj?

Akacio respondis: Servisto de la Plejalta Dio kaj gardisto de lia eminenta trono.

2 Marciano diris: Kiu vana filozofia diskuto trompis vin? Prefere malŝatu la nevideblaĵojn, kaj rekonu la Diojn, kiujn vi vidas.

Akacio respondis: Kiuj estas, al kiuj vi ordonas ke mi oferu?

Marciano diris: Al Apolono, nia Savanto, la forpelanto de malsato kaj pesto, kiu savas la tutan mondon kaj regas ĝin.

Akacio respondis: Ĉu tiu klariganto – kiel vi kredas – pri la estonto? Kiam li – kompatinda – am-brulis pri knabino, sensaĝe li nur kuregis, nesciante ke sian predon li perdos: klariĝis do, ke li estis nek Dia, ĉar tion

⁶ En la Latina mankas ligaj vortoj: *Deus Abraham, Deus Isaac, Deus Iacob*.

li ne antaŭvidis, nek Dio, ĉar trompis lin knabino. Kaj tio ne estis lia sola ĉagreno: la sorto punis lin baldaŭ per pli grava perdo: li hontinde enamiĝis je knaboj, kaj foje kaptite de la beleco de certa Hiacinto, kiel vi bone scias, li ekbrulis en amo, kaj la kompatinda – senscia pri la estonto – mortigis lin, kiun li deziris viva, per sia disko. Li, kiu foje sklave laboris kune kun Neptuno, li kiu alies brutaron devis savi – al li vi deziras, ke mi oferu? Ĉu hazarde <mi oferu> al Eskulapo, kiu mortis per fulmo, ĉu al Venera, kiu adultis, ĉu al la ceteraj monstroj de ĉi vivo aŭ de ĉi perejo?

Ĉu tiujn mi do adoru, kiujn mi ne povas imiti, kiujn mi malŝatas, kiujn mi akuzas, ja abomenas!? Kies agojn se nun iu imitus, li certe ne kapablas eskapi la severecon de viaj leĝoj: do ĉe kelkaj vi adoras, kion ĉe aliaj vi grave punas!?

Marciano diris: Estas kutimo de la kristanoj kunigi amason da sakraĵojn kontraŭ niaj Dioj. Tial mi ordonas vin, veni kun mi al Jovo kaj Junona, por ke ni donu kio estas inda, kune celebrante solenan bankedon al la Dioj.

Akacio respondis: Kiel mi ĉi tie faru oferon al li, kies tombo – kiel konate – troviĝas sur Kreto⁷? Ĉu eble li resurektis el la morto?

3 Marciano diris: Oferu, aŭ mortu!

Akacio respondis: Jen kion faras la lertegaj rabistoj de Dalmatio: post kiam stretajn stratojn aŭ nekonatajn erarvojojn ili baris por malbonfari, ili ĉasas unuopajn pasantojn kaj tuj se venas iu piediranto, ili metas lin sub jena devigo, ke aŭ sian monon li lasu al ili, aŭ la vivon; tie do neniu demandas, kio estas racia en la afero, sed nur kion kapablas tiu, kiu devigas.

Simila estas ĉe via deziro, ĉar vi ordonas min aŭ fari maljustajn aferojn, aŭ vi minacas per pereigo. Nenion mi timas, nenion mi malkuraĝas. La publika juro punas putinmaniulon, adultulon, ŝteliston, seksperfortanton de knaboj, sorĉiston aŭ murdiston. Se ion tian mi kulpas, antaŭ ol vi tion

⁷ Estas ofta temo en la Greka filozofia religio-kritikado, ke Dioj ofte estas mortintaj reĝoj. Pri Zeŭso (= Jovo) tombon oni konis sur Kreto.

dirus, mi jam kondamnus min mem; sed se ĉar la Dion, kiu estas vera, mi kultas, mi estos kondukata al puno, tiam mi kondamniĝos ne pro deziro de la leĝo sed de la juĝisto. Iu profeto diris minace: *Neniu plu serĉas Dion; ĉiuj misvojiris, samtempe fariĝis senvaloraj*; tial vi ne povos senkulpigi vin. Estas ja skribite: *Je la juĝo kiun vi juĝas, vi estos juĝata*; kaj ankaŭ: *Kiel vi juĝas, tiel vi estos juĝata*; kaj kiel vi faras, tiel okazos al vi.

Marciano diris: Mi ne havas ordonon juĝi, sed devigi; se vi tion malŝatas, estu certigita pri via puno.

Akacio respondis: Al mi estas ordonite, ke mi ne negu mian Dion; se vi sklavas al homo rompiĝema kaj konkrete karna, kiu baldaŭ malaperos el ĉi mondo, pri kiu vi scias, ke baldaŭ vermoj manĝos lin, kiom pli do mi devas obei al la plej potenca Dio, per kies forto ĉio estas kreita, kio ekzistas por eterne, kaj kiu diris: *Kiu negas min antaŭ la homoj, ankaŭ mi negos lin antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo, kiam mi venos en gloro kaj forto por juĝi vivantojn kaj mortintojn.*

4 Marciano diris: Kion daŭre mi intencis sciiĝi, subite vi mem konfesis: la ĉefan eraron de via religio kaj de via leĝo. Do, via Dio havas filon, ĉu vi ne diris?

Akacio respondis: Jes.

Marciano diris: Kiu estas tiu filo de via Dio?

Akacio respondis: La parolo de vero kaj de graco.

Marciano diris: Ĉu ĝi havas nomon?

Akacio respondis: Vi ne demandis pri lia nomo, sed pri la potenco de tiu filo.

Marciano diris: Klarigu kiel li nomiĝas.

Akacio respondis: Li nomiĝas Jesuo Kristo.

Marciano diris: El kiu edzino de Dio li naskiĝis?

Akacio respondis: Ne laŭ homa kutimo Dio generis filon el sekskuniĝo kun virino (absurde estus se vi dirus, ke la Dia majesto estu en tia

kontakto kun mortideva knabino), sed Li formis Adamon kiel unuan per sia kreanta dekstra mano – el argilo Li faris la membrojn de tiu unua homo kaj kiam la kompletan aspekton Li jam pretigis, animon kaj spiriton Li atribuis – sed la dua, la filo de Dio, la Parolo de Vero, eliris el la koro de Dio. Tial estas skribite: *El mia koro aperis bona parolo*⁸.

Marciano diris: Ĉu do via Dio estas korpeca?

Akacio diris: Nur Li tion scias, sed ni ne perceptas lian nevideblan formon, sed liajn forton kaj potencon ni adoras.

Marciano diris. Se Li ne estas en korpo, Li ankaŭ ne scias pri koro kaj sento; sentoj ne povas ekzisti sen membroj.

Akacio respondis: Ne en ĉi membroj naskiĝas saĝo, sed ĝi estas dono de Dio. Kio do estas la rilato inter korpo kaj sentoj?

Marciano diris: Vi konas la Katafrigojn⁹, kiuj havas tre malnovan religion kaj kiuj, kiam ili transiris al miaj ritoj, forlasis, kio ili estis kaj prezentis oferojn kune kun ni al la Dioj: hastu ankaŭ vi same kiel ili obei. Unuigu ĉiujn kristanojn de la katolika leĝo, kaj kune kun ili sekvu la religion de nia imperiestro. La tuta popolo sekvu vin, ĉar ĝi ja dependas de via juĝo.

Akacio respondis. Ili ne estas regataj de mia deziro, sed de la preceptoj de Dio. Ili aŭskultas min, se mi admonas justaĵojn. Sed se maljustaĵojn kaj malprofitajn, ili malŝatos min.

5 Marciano diris: Donu al mi ĉies nomojn.

Akacio respondis: Iliaj nomoj estas notitaj en la ĉiela libro, kaj skribitaj sur la paĝoj de Dio. Kiel ja homaj okuloj vidu, kion notis la senmorta kaj nevidebla forto de Dio?

Marciano diris: Kie estas la magoj, kamaradoj de via arto aŭ doktoroj de ĉi artplena trompo?

⁸ Iom stranga cito laŭ Psalmo 45:1.

⁹ Temas pri Montanistoj.

Akacio respondis: De Dio ni ricevis kaj ricevos ĉion, sed tiun sekton de magia arto ni abomenas.

Marciano diris: Tial vi estas magoj, ĉar vi enkondukas iun nekonatan novan specon de religio.

Akacio respondis: Tiujn <Diojn> ni prifajfas, kiujn vi unue produktas kaj poste respektas; viaj Dioj vin desapontos, se la artisto ne taŭgis por la ŝtono, aŭ la ŝtono ne sufiĉis por la artisto. Sed ni respektas tiun, kiun ne ni fabrikis, sed de kiu ni estas faritaj: Li kreis nin kiel Sinjoro, amas nin kiel Patro, kaj kiel bona patrono liberigis nin de la eterna morto.

Marciano diris: Donu la nomojn, por ke vi ne falu sub la puno.

Akacio respondis: Mi mem staras antaŭ via juĝista trono, kaj vi petas nomojn. Ĉu vi atendas, ke vi povas venki multajn, se mi sola povas venki vin? Se mian propran nomon vi serĉas: mi nomiĝas Akacio; kaj se vi ŝatas nomojn, mi ankaŭ nomiĝas Agatanĝelo¹⁰, kaj Pizono estas episkopo de l' Trajanoj¹¹, kaj Menandro la presbitero. Agu do jam laŭplaĉe.

Marciano diris: Vi nun iru en la karceron, kaj la imperiestro legu tiujn ĉi raportaĵojn, kaj laŭ lia decido okazu, kion ni faru pri vi.

Post kiam imperiestro Decio legis ĉi raportaĵojn, li miris pri ĉi interparolado plena je tiom da respondoj, kaj li ekridis. Baldaŭ poste li donis al Marciano la prefektecon pri Pamfilio; sed al Akacio li donis sian propran admiron kaj redonis lin al la propra leĝo.

Tio ĉi okazis, dum Marciano estis konsula reprezentanto, sub imperiestro Decio, la kvaran tagon antaŭ la kalendoj de aprilo¹².

¹⁰ Greke: Bona anĝelo.

¹¹ Neklara aludo.

¹² la 29an de marto 250.

Prokonsula akto de Maksimo

1 Ĉar imperiestro Decio deziris ekstermi aŭ neniigi la leĝon de la kristanoj, li faris dekretojn por la tuta mondo, ke ĉiuj kristanoj negu la vivantan kaj veran Dion kaj oferu al la demonoj; kiuj tion ne volis fari, tiuj estu submetita al torturado.

Tiutempe la servanto de Dio Maksimo, sanktulo, propravole prezentis sin: li estis plebano, kun propra butikoj.

Kaptite li estis prezentita al Optimo, prokonsulo en Azio¹³.

La prokonsulo diris al li: Kiel vi nomiĝas?

Li respondis: Mi nomiĝas Maksimo.

La prokonsulo diris: Al kiu rango vi apartenas?

Maksimo diris: Mi estas libere naskita, sed sklavo de Kristo.

La prokonsulo diris: Kiun profesion vi havas?

Maksimo diris. Mi estas plebano, kaj vivas de mia negoco.

La prokonsulo diris: Ĉu vi estas kristano?

Maksimo respondis: Kvankam pekulo, mi estas kristano.

¹³ Okcidenta Turkio.

La prokonsulo diris. Ĉu vi ne eksciis pri la dekretoj de l' plej nevenkeblaj princoj kiuj antaŭ nelonge ekvalidis?

Maksimo diris: Kiuj?

La prokonsulo diris: Ke ĉiuj kristanoj forlasu sian superfluan superstiĉon kaj rekonu la veran princon, al kiu ĉio estas submetita, kaj adoru liajn Diojn.

Maksimo respondis: La maljustan verdikton eldiritan de la reĝo de ĉi mondo, mi ekkonis, kaj tial senkaŝe mi min montris.

La prokonsulo diris: Oferu do al la Dioj.

Maksimo respondis: Mi ne oferos, krom al la unusola Dio, al kiu mi min gratulas esti oferanta de post mia junaĝo.

La prokonsulo diris: oferu por saviĝi. Se tion vi ne volas, mi faros ke vi mortos sub diversaj torturoj.

Maksimo respondis: Tion mi jam ĉiam esperis: tial mi ja montris min, por ke finfine – liberigite de ĉi mizera kaj portempa vivo – mi ricevu la eternan vivon.

2 La prokonsulo ordonis skurĝi lin per bastonoj. Dum li estis tradraŝata, li diris: Oferu, Maksimo, por liberiĝi el ĉi turmentoj.

Maksimo respondis: Ne estas turmentoj, ĉar ili estas farataj pro la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Estas unĝventoj. Se mi defalos de la ordonoj de mia Sinjoro, pri kiuj la evangelio instruis min, tiam atendos min veraj turmentoj.

Tiam la prokonsulo ordonis pendigi lin torturbenko. Dum li turmentiĝis, li diris al li. Mizerulo, saĝiĝu jam el via stulteco kaj oferu, por gajni vian animon.

Maksimo respondis: Mian animon mi gajnos, se mi ne oferos. Ĉar se mi oferos, mi ĝin perdos. Ĉar nek bastonoj nek najloj nek fajro donas doloron al mi; ĉar restas en mi la graco de Kristo, kiu min savos por

eterne, kune kun la preĝadoj de ĉiuj sanktuloj, kiuj en ĉi luktado viajn stultaĵojn venkis kaj postlasis al ni ekzemplojn de forteco.

Tiam la prokonsulo donis verdikton pri li: Lin, kiu ne bonvolis konsenti pri la sanktaj leĝoj; lin, kiu rifuzis oferi al la granda Diino Diana, por timigo de la ceteraj kristanoj la Dia kompatemo¹⁴ ordonis priĵeti per ŝtonoj.

Tiel la atleto de Kristo estis forprenita de la sklavo de l' diablo, dum la diris dankon al Dio la Patro per ties filo Jesuo Kristo, kiu juĝis lin inda por venki en la batalo kontraŭ la diablo; trenite ekster la murojn, priĵetita de ŝtonoj, li donis la spiriton.

3 Suferis pasionon la servanto de Dio Maksimo en la provinco Azio, je la dua tago antaŭ la iduoj de majo¹⁵, sub imperiestro Decio kaj prokonsulo Optimo, dum envere regis nia Sinjoro Jesuo Kristo: al li estu la gloro en la jarcentojn de l' jarcentoj. Amen.

¹⁴ = imperiestro Decio.

¹⁵ la 14an de majo 250.

Luciano kaj Marciano

La martirakto de Luciano kaj Marciano konsistas el du malsamaj partoj:
unuflanke kun pia tendenco la rakonto pri ilia konvertiĝo al kristanismo
– aliflanke sufiĉe seka pridemandado de prokonsulo Sabino.

Martirakto de Luciano¹⁶ kaj Marciano

1 Mi deziras rakonti al vi, fratoj, la martiriĝon de Luciano kaj Marciano, por edifi vin, dum vi tion aŭskultos.

Dum ili ankoraŭ estis kaptitaj en la eraro de l' paganoj, ili estis tiom dediĉitaj al la demonoj, ke preskaŭ ĉiun animon ili sciis konvinkante alkonduki al sia sakrilegia sekto. Ĉar ankaŭ per magiaj kaj sorĉistaj artoj ili kontaĝis ĉiujn en sia adultado¹⁷. Ili estis unuarangaj en la frenezo, perturbantoj en magiaj venenmiksado; kaj ĉiuj, kiuj serĉis perfektigi siajn dezirojn aŭ serĉis kiamaniere damaĝi al aliaj, sin turnis al ili.

Sed Dio, kiu donas gracon al homoj kiuj tion ne meritas, kaj kiu bonvolas konduki al ekkono de lia nomo eĉ homojn, kiuj ne serĉas lin, jene konvertis ilin:

2 Estis certa servistino de Dio, ĉasta kaj fidela, malŝatante la nupton, gardante la virgecon; aspekte tre bela, anime tamen multe pli bela, ŝi neniun amis krom nur sole Dion. Sen iu ajn instiganto, tre obstine, ŝi petis, ke li bonvolu gardi ŝin. Luciano kaj Marciano ŝin ekdeziris; kaj kiam ili ne trovis eblon, kontentigi sian malĉastan deziron pri ŝi, ili kredis, ke nur per magiaj demonajoj kaj sorĉado ili povos superi ŝin. Kiam ĉion ili jam montris pri siaj artoj, kaj konstatis ke nenion ili atingas, ili ekkoleris kaj tremadis ĉar neniel ili kapablas superforti ŝin. Sed ŝi

¹⁶ Temas pri la sama nomo kiel la Greka aŭtoro *Lukiano*, sed tiutempe en la Latina oni prononcis ĝin *Luciano*.

¹⁷ Adultado – ofte en kristanaj tekstoj = adorado de idoloj.

servadis al Dio kaj tranoktadis en vigilaroj kaj preĝoj. Ili tamen farante plurajn magiaĵojn, ellacigis siajn Diojn, por ke tiuj donu respondon. Kaj la demonoj ankaŭ donis respondojn: Se nin alvokante vi volis miskonduki iajn ajn animojn, kiuj ne rekonas la Dion, kiu estas en la ĉielo, por ni estus plej facile liveri al vi tiujn. Sed ĉar nia batalo direktiĝas al ĉi tiu plej ĉasta animo: multe ni jam plenumis, sed nenion ni atingas kontraŭ ŝi. Ŝi konservas sian virgecon senmakulan por Jesuo Kristo, sia Sinjoro, la Dio de ĉiuj, kiu estis krucumita por ĉies saviĝo: li mem gardas ŝin kaj dolorigas nin. Tial nenion ni povas fari kontraŭ ŝi, kaj en nenio ni povos superforti ŝin.

Dum ĉi tio okazis publike, trafite de stuporo kaj timo ili kvazaŭ mortintaj falis vizaĝaltere. Iom poste ili revenis al si mem, faris novajn magiaĵojn kaj forigis la demonojn de si. Reciproke ili plendadis: Ĉar multe kapablas tiu Jesuo Kristo, tiu krucumito, kiu estras super ĉio, li ankaŭ superas la demonojn kaj ĉiujn niajn magiajn artojn kaj venenaĵojn. Al li ni do devos konvertiĝi, kaj lin respekti kaj adori, ĉar li povos doni al ni pli ol tiuj, kiujn ĝis nun senrezulte ni adoris.

3 Sed kiam abundis la peko, superabundis ankaŭ la graco. Do tuj siajn kodeksojn¹⁸ ili portis en la mezon de la urbo, kaj en fajro forbruligis ilin. Ĉiuj kiuj tion vidis estis konfuzitaj. Sed ili diris al la amaso: La Sinjoro ja malfermis nian intelekton, por ke el tenebro kaj ombro de la morto, en kiuj ĝis nun ni estis enfermitaj, liberigitaj li konduku nin al la vera saviĝo. Ĉio ĉi tamen estas vana kaj senenhava, kaj kion ni faris ĝis nun, inventis la demonoj. Sed nun ni ekkonis tiun veran Dion, kaj en li ni metas nian esperon.

Do irante al la eklezio, ili konfesis ĉion kion ili faris. Kaj kiam ili fariĝis kristanoj, kaj poste estis baptitaj, prilumate, ili ekserĉis sekretajn lokojn, ĉion forlasante. Kaj dum la tuta tempo doloringante sin, punante sian korpon, ili konfesis al la Sinjoro ĉion kion ili faris: ili tiom ellacigis sin mem en fastado kaj preĝado, ke la trian tagon ili nenion plu toleris krom panon kaj akvon.

¹⁸ Kun sorĉotekstoj.

4 Post tio tamen ili predikadis la Parolon de Dio kun konfido, kaj ili priĵuris ĉiuj gojojn ke ili estas kaptitaj de senenhavaj eraroj. Aŭskultante ilin tamen la amaso miris, dirante: Jen ili instruis nin, kaj per siaj artoj niajn dezirojn ili plenumis, kaj nun ili predikas tiun Krucumiton, kiun anticipe ili kontraŭbatalis. Sed ili responde diris: KREDU al ni, fratoj: se ne ni ekkonus, ke tio ĉi estas pli bona, neniam ni estus konvertiĝintaj al li. Do ankaŭ vi nun konvertiĝu al li, kaj vi saviĝos. Sed kolerplenaj kaptis ilin kaj kondukis al la prokonsulo Sabino, ĉar tiutempe estis persekutado de la kristanoj, ordonite de imperiestro Decio. Kiam ili estis prezentitaj al la prokonsulo, ili diris. Jen kion antaŭe ili predikis, tion ili nun kontraŭas; kaj kion ili kontraŭis, tion ili nun predikas.

5 Prokonsulo Sabino diris al Luciano: Kiel vi nomiĝas?

Li respondis: Luciano.

La prokonsulo diris: Kia homo vi estas?

Luciano diris: Iam mi estis persekutanto de la adorinda leĝo, sed nun – kvankam ne inda – mi estas ĝia predikanto.

La prokonsulo diris: Kiun funkcion vi plenumas, ke vi predikas?

Luciano diris: Ĉiu animo havas eblon regajni sian fraton el eraro, por ankaŭ meriti al si mem gracon kaj liberigi la fraton el katenoj de l' diablo.

6 Prokonsulo Sabino diris al Marciano. Kiel vi nomiĝas?

Li respondis: Marciano.

La prokonsulo diris: Kio vi estas?

Marciano diris: Senkulpa kultanto de l' sakramentoj de Dio.

La prokonsulo Sabino diris al Marciano: Kiu konvinkis vin, ke forlasante la adorindajn kaj verajn Diojn, de kiuj vi ricevis tiom multe kaj pro kiuj vi estis amata ĉe la popolo, – ke vi transiru al tiu mortinto, tiu krucumito, kiu sin mem eĉ ne kapablis savi?

Marciano respondis: Li donis tion al ni, li, kiu ankaŭ jam donis tion al sankta Paŭlo, kiu estinte persekutanto de l' eklezioj, poste dank' al lia graco fariĝis predikanto.

La prokonsulo Sabino diris. Interkonsiliĝu, kaj reiru al via antaŭa vivo, por ke la adorindaj Dioj kaj la nevenkeblaj princoj estu bonvolaj al vi: tiel vi savos la vivon!

Luciano diris: Vi parolas kiel unu el la stultuloj. Sed ni – kvankam nur nesufiĉe – ni dankas Dion, kiu eltrenante nin el tenebro kaj ombro de morto, bonvolis konduki nin al tiu ĉi gloro.

La prokonsulo Sabino diris. Kial li do ne defendas vin – ke li transdonas vin en miajn manojn? Kial li do ne ĉeestas al vi por ke vi ne mortu? Mi krome scias, ke kiam vi ankoraŭ havis vian ĝustan intelekton, vi povis doni multon al multe da homoj.

Sankta Marciano diris: Tio estas la gloro de l' kristanoj, ke se ni perdas, kion vi kredas la vivo, ke tiam, ĝisfine eltenante ni akiras la veran kaj eternan vivon. Ni ja esperas, ke tian gracon kaj komprenon donu al vi Dio, ke vi komprenos, kia kaj kiel granda li estas kaj kiom li donacas al homoj, kiuj fidis je li.

Prokonsulo Sabino diris: Tiel do montriĝas, kiom li donacas al vi, ke nun, kiel mi diris, li transdonas vin en miajn manojn.

Sankta Luciano diris: Ni jam diris, ke tia estas la gloro de la kristanoj, kaj la Sinjoro promesis, ke kiuj fidele batalis kontraŭ la diablo, kaj kiuj malŝatis ties minacojn kaj la nunajn neperfektaĵojn, akiros la eternan vivon estontan.

Prokonsulo Sabino diris: Kion vi rakontas, estas fabeloj de maljunulinoj. Obeu min, kaj oferu al la Dioj, plenumu la imperiestrajn ordonojn, por ke mi ne, en grandega kolero, submetu vin al novtipaj kaj ekskvizitaj turmentoj.

Sankta Marciano respondis: Ni estas pretaj, ke vi submetu nin al ĉiuj turmentoj, kiujn vi volas, prefere ol, negante la vivantan kaj veran Dion,

eniri en la eksteran tenebron kaj la neestingeban fajron, kiun Dio preparis por la diablo kaj ties servantoj.

7 Vidante ilian obstinon, la prokonsulo Sabino eldiris kontraŭ ili la verdikton: Ĉar Luciano kaj Marciano, kiuj malobservis niajn Diajn leĝojn, kaj transiris al la plej vana leĝo de la kristanoj, malgraŭ nia admono kaj nia prienketado, kun malŝato ne volis obei al nia ordono fari oferojn kaj saviĝi, mi ordonas ke ili per fajro estu bruligitaj.

Kiam oni kondukis ilin al la koncerna loko, kvazaŭ unuvoĉe ili dankis Dion kaj diris: Al vi, Sinjoro Jesuo, ni diras niajn nesufiĉajn laŭdojn, ĉar nin – mizerajn kaj neindajn – vi savis el la eraro de l' paganeco, kaj vi bonvolis konduki nin al ĉi plej alta adorinda pasiono pro via nomo, por fari nin partoprenantoj kune kun ĉiuj viaj sanktuloj. Al vi estu la laŭdo, al vi la gloro, al vi ni ankaŭ rekomendas nian animon kaj nian spiriton.

Kiam sian preĝon ili plenumis, la ekzekutistoj tuj metis fajron en la brulŝtiparon.

Tiel la honorindaj martiroj plenumis sian *agon*¹⁹, kaj meritis partopreni la pasionon de la Sinjoro.

8 Suferis pasionon la plej feliĉaj martiroj Luciano kaj Marciano en la sepa tago antaŭ la kalendoj de novembro²⁰, sub imperiestro Decio kaj prokonsulo Sabino, dum envere regis nia Sinjoro Jesuo Kristo: al li estu la gloro, la forto kaj la potenco en la jarcentojn de l' jarcentoj. Amen.

¹⁹ Greke: konkurso. Sama metaforo kiel ĉe Tertuliano – *Al la Martiroj*.

²⁰ la 25an de oktobro 250.

Cipriano

Ciprianon ni jam renkontis kiel aŭtoron – ĉi tie sekvas la t. n. Prokonsula Akto (el 258 p. Kr.) pri lia pridemandado kaj la mortverdikto.

Prokonsula Akto pri Cipriano

1 Kiam imperiestro Valeriano kvarfoje kaj Galieno trifoje estis konsuloj, triatage antaŭ la kalendoj de septembro²¹, en la oficejo en Kartago, prokonsulo Paterno diris al episkopo Cipriano: La plej sanktaj imperiestroj Valeriano kaj Galieno bonvolis sendi leteron al mi, por ordoni, ke tiuj, kiuj ne observas la Romian religion, rekonu la Romiajn ceremoniojn. Tial mi venigis vin persone: kion vi respondas al mi?

Episkopo Cipriano diris: Kristano mi estas kaj episkopo; mi ne konas aliajn Diojn krom la unusolan kaj veran Dion, kiu faris ĉielon kaj teron, la maron kaj ĉion, kio estas en ĝi. Al tiu Dio ni kristanoj servas, al Li ni preĝas tage kaj nokte por ni mem kaj por ĉiuj homoj kaj por la bonfarto de la imperiestroj mem.

Prokonsulo Paterno diris: Ĉu vi restas ĉe tiu deziro?

Episkopo Cipriano respondis: Bona deziro, kiu rekonas Dion, ne povas ŝanĝiĝi.

Prokonsulo Paterno diris: Ĉu do, konforme al la ordono de Valeriano kaj Galieno, vi pretas iri en ekzilon al la urbo Kurubo²²?

Episkopo Cipriano diris: Mi iros.

²¹ la 30an de aŭgusto 257.

²² *Curubis*, proksime je Kartago.

Prokonsulo Paterno diris: Ne nur pri episkopoj, sed ankaŭ pri presbiteroj ili bonvolis skribi al mi. Do mi volas scii de vi, kiuj estas la presbiteroj, kiuj vivas en ĉi tiu urbo?

Episkopo Cipriano respondis: Vi bonvolis bone kaj utile fiksi en viaj leĝoj, ke ne estu denunciatoj. Tial ili ne povas esti malkaŝataj aŭ denunciataj de mi. Sed ili estas troveblaj en siaj urboj.

Prokonsulo Paterno diris: Hodiaŭ ĉi tie mi enketos.

<Episkopo> Cipriano diris: Ĉar nia doktrino malpermesas, ke iu el si mem prezentu sin, kaj ĉar ankaŭ al viaj reguloj tio ne akordas, ili ne povas prezenti sin mem. Sed se vi serĉos, vi ilin trovos.

Prokonsulo Paterno diris: Mi ilin trovos. Kaj li aldonis: Ili ja ordonis, ke en neniu loko ekzistu privataj organizaĵoj, kaj ke oni ne eniru tombejojn. Do, se iu malobeos al ĉi tiu salubra ordono, tiu suferos morto-punon.

Episkopo Cipriano respondis: Faru, kio estis ordonita al vi.

2 Tiam prokonsulo Paterno igis transporti la sanktan episkopon Cipriano en ekzilon. Kaj kiam tie li jam longe estis, al prokonsulo Aspazio Paterno postsekvis prokonsulo Galerio Maksimo, kiu igis revoki la sanktan episkopon Cipriano el la ekzilo kaj prezenti lin al li.

Kiam sankta Cipriano, kiun Dio elektis martiro, revenis el la urbo Kurubo, kien laŭ ordono de la tiama prokonsulo Aspazio Paterno li estis ekzilita, li restis pro la sanktaj ordonoj en siaj propraj ĝardenoj, kaj tie li ĉiutage atendis, ke oni venos por li, laŭ la vizio, kiun li ricevis.

Kaj dum tie li restadis, subite je la iduoj de septembro²³, dum la konsuleco de Tusko kaj Baso, venis al li du oficistoj, unu korpogardisto de la oficejo de prokonsulo Galerio Maksimo, kiu postsekvis al Aspazio Paterno, kaj la alia gvardiestro²⁴ de la sama oficejo. Per veturilo ili venis kaj transportis lin, kaj starigis lin en sia mezo. Ili kondukis lin en la

²³ La 13an de septembro 258.

²⁴ Ambaŭ titoloj estas ne tute klaraj.

<vilaon> de Seksto, kien la menciita prokonsulo Galerio Maksimo retiriĝis por reakiri sian sanon.

Prokonsulo Galerio Maksimo ordonis, ke oni retenu Ciprianon por li por la sekva tago.

Tiutempe do sankta Cipriano, kiu estis kondukita al la estro kaj la korpogardisto de la oficejo de l' menciita prokonsula moŝto Galerio Maksimo, tie gastis ĉe li en la strato, kiun oni nomas la Saturnostrato, inter tiuj de Venera kaj de la Savo.

La tuta amaso de la fratoj²⁵ tien amasiĝis, kaj kiam sankta Cipriano tion eksciis, li ordonis ke oni bone gardu la junulinojn, ĉar ĉiuj restadis antaŭ la pordo de la oficisto, kie li gastis.

3 La sekvan tagon, dekokatage de la kalendoj de oktobro, frumatene, granda amaso kunvenis ĉe la <vilao> de Seksto laŭ ordono de prokonsulo Galerio Maksimo. La menciita prokonsulo Galerio Maksimo do igis prezenti al li tiun tagon Ciprianon en la atrio de la sedanta Saŭkiolo²⁶.

Kiam oni prezentis lin al li, prokonsulo Galerio Maksimo diris al episkopo Cipriano: Ĉu vi estas Tascio Cipriano?

Episkopo Cipriano respondis: Estas mi.

Prokonsulo Galerio Maksimo diris: Ĉu vi prezentis vin kiel papon²⁷ al ĉi tiuj sakrilegiuloj?

Episkopo Cipriano respondis: Jes.

Prokonsulo Galerio Maksimo diris: La plej sanktaj imperiestroj ordonis al vi celebri oferojn.

²⁵ Do la lokaj kristanoj. Ke la vorto fratoj implicas ankaŭ la inajn membrojn de la komunumo, montriĝas el tio, ke Cipriano speciale atentis pri la junulinoj.

²⁶ Indiko ne klara.

²⁷ La baza signifo de ĉi Latina vorto *papa* estas *patro*. Ankaŭ en pluraj leteroj Cipriano estas alparolata per la honortitolo *papo*.

Episkopo Cipriano diris: Tion mi ne faras.

<Prokonsulo> Galerio Maksimo diris: Pripensu bone!

Episkopo Cipriano respondis: Faru, kio estis ordonita al vi. En afero tiel justa superfluas pripensado.

4 Galerio Maksimo interparolis kun la konsilio, kaj pene kaj kontraŭvole li eldiris la verdikton per ĉi tiuj vortoj: Longe vi vivis sakrilegie, kaj multajn homojn vi alkondukis al tiu via krima konspiro, kaj vi montris vin malamika al la Dioj de Romo kaj al la sanktaj religiaj ritoj, kaj eĉ la piaj kaj plej sanktaj imperiestroj Valeriano kaj Galieno Aŭgustoj kaj la plej nobla Cezaro Valeriano ne sukcesis revoki vin al observado de siaj ceremonioj. Tial, ĉar vi pruviĝis esti instiganto kaj ĉefo de plej abomenaj krimoj, vi estos punata kiel ekzemplo por tiuj, kiujn en via krimeco vi ĉirkaŭ vi amasigis: la disciplino estos konfirmata per via sango.

Post tio, de la vakstabulo oni voĉlegis la verdikton: Tascio Cipriano estas kondamnita je morto per la glavo.

Episkopo Cipriano diris: Al Dio dankon.

5 Sed post ĉi tiu verdikto la amaso de la fratoj diris: Ankaŭ ni estu senkapigitaj kune kun li. Tial do estiĝis granda tumulto inter la fratoj, kaj granda amaso sekvis lin.

Kaj tiel do Cipriano estis kondukita al la agro de Seksto, kaj tie li senigis sin de mantelo kaj kapuĉo, surgenuiĝis sur la tero, kaj etendis sin en preĝo al la Sinjoro. Kaj kiam li senigis sin de la dalmatiko kaj donis ĝin al la diakonoj, li staris en sia tola vestaĵo kaj atendis la ekzekutiston.

Kiam venis la ekzekutisto, li ordonis al la siaj, ke ili pagu al la ekzekutisto dudek kvin orajn monerojn. La fratoj metis tolajn tukojn kaj viŝtukojn antaŭ li sur la teron. Poste sankta Cipriano provis kovri al si la okulojn propramane. Sed ĉar li ne sukcesis bone ligi la tuketojn antaŭ la okulojn, presbitero Juliano kaj subdiakono Juliano helpis ligi lin.

Tiel sankta Cipriano mortis martire, kaj por eviti la kuriozecon de la paganoj oni enterigis lian korpon tute apude. Sed nokte oni ekprenis kaj transportis ĝin kun kandeloj kaj torĉoj sub multa respekto kaj granda

triumfo al la cimetero de prokuratoro Makrobio Kandidiano, kiu troviĝas ĉe la vojo de Mapalo apud la akvorezervujo.

Kelkajn tagojn poste, tamen, forpasis prokonsulo Galerio Maksimo.

6 Mortis kiel martiro la plej sankta Cipriano dekokatage antaŭ la kalendoj de oktobro sub la imperiestroj Valeriano kaj Galiano²⁸, dum envere regadis nia Sinjoro Jesuo Kristo, al kiu estas honoro kaj gloro en la jarcentojn de l' jarcentoj. Amen.

²⁸ La 14an de septembro 258.

*El la epoko de imperiestro Diokleciano
datiĝas la Martirakto de Julio (ĉ. 302):*

Martirakto de Julio

1 En la tempo de persekutado, kiam gloraj bataloj prezentiĝis al la fiduloj, per kiuj ili povis atendi la eternajn promesojn, tiutempe de oficistoj estis kaptita Julio; oni kondukis lin al guberniestro Maksimo.

Guberniestro Maksimo diris: Kiu li estas?

El la oficejo estis dirite: Li estas kristano, kaj ne volas obei al la imperiestraj ediktoj.

La guberniestro diris: Kiel vi nomiĝas?

Li respondis: Julio.

La guberniestro diris: Kion vi diras, Julio? Ĉu estas vere, kion oni diras pri vi?

Julio respondis: Jes, mi estas kristano; mi ne neas ke mi estas kio mi estas.

La guberniestro diris: Ĉu vi ne konas la ediktojn imperiestrajn, kiuj ordonas oferi al la Dioj?

Julio respondis. Mi ne ignoras tiujn; sed kristano mi estas, kaj mi ne povas fari, kion vi volas. Mi ne devas forgesi mian Dion, la veran kaj vivan.

2 Guberniestro Maksimo diris: Ĉu estas tiel grave oferi iom da incenso kaj foriri?

Julio respondis. Mi ne povas malŝati la Diajn ordonojn kaj montri min malfidela al mia Dio. Ĉar dum oni vidis min sekvi la vanan militadon, neniam en tiuj 27 jaroj mi devis aperi antaŭ juĝisto kiel krimulo aŭ kverelulo. Sepfoje mi eliris en militkampanjon, kaj al neniu mi estis malsupera, kaj mi ne malpli forte batalis ol iu ajn. La estro neniam vidis min misiri, kaj ĉu nun vi kredas ke mi, kiu en la antaŭaj aferoj ĉiam estis fidela, povos montriĝi malfidela en ĉi pli gravaj aferoj?

Guberniestro Maksimo diris: Kian servon vi plenumis?

Julio respondis: Mi estis soldato sub la armiloj, kaj revenis kiel veterano. Mi ĉiam fidele kultivis Dion kiu kreis ĉielon kaj teron, kaj mi ankoraŭ montras mian servon al li.

Guberniestro Maksimo diris: Julio, mi vidas ke vi estas saĝa kaj serioza homo. Ofere do al la Dioj; lasu vin konvinki de mi, kaj vi ricevos grandan rekompencan.

Julio respondis: Mi ne faros kion vi volas, por ne trafi eternan punon.

Guberniestro Maksimo diris: Se vi kredas ke estas peko, mi prenas tion sur min. Mi ja perforte devigas vin: vi ne agos libervole. Poste tamen vi kviete iru hejmen, kaj vi ricevos la monon de la dekjara festo, kaj estonte neniu plu ĝenos vin pri tio ĉi.

Julio respondis: Nek via Satana mono nek via ruza elpensado povos senigi min de la eterna lumo. Dion nei mi ne povas. Do verdiktu kontraŭ mi kiel kontraŭ kristano.

3 Maksimo diris: Se vi ne obeos al la imperiestraj ediktoj kaj oferos, mi devos senkapigi vin.

Julio diris: Tion vi bone konstatis. Do vi petegas vin, pia guberniestro, je la saviĝo de viaj imperiestroj: plenumu viajn konkludojn kaj verdiktu kontraŭ mi, por ke realiĝu mia deziro.

Guberniestro Maksimo diris: Se vi ne pentos kaj oferos, mi transdonos vin laŭ via deziro.

Julio respondis: Si tion mi meritos suferi, min atendos eterna laŭdo.

Maksimo diris: Tion vi imagas; ĉar se pro la leĝoj de la patrujo vi suferus, vi ricevus eternan laŭdon.

Julio respondis: Pro leĝoj tion mi suferos – sed ja de Dio!

Maksimo diris: Kiujn donis al vi iu mortinto, iu krucumito? Rigardu kiel stulta vi estas, ke vi pli timas mortinton ol imperiestrojn kiuj vivas.

Julio respondis: Li mortis pro niaj pekoj, por doni al ni eternan vivon. Sed Dio mem estas Kristo kiu restos ĝis eterne. Sed lin iu konfesas, tiu havos eternan vivon; sed kiu lin neas, havos punon eternan.

Maksimo diris: Kunsentante mi konsilas al vi ke vi oferu kaj vivu plu kun ni.

Julio respondis: Se mi vivos kun vi, mi ricevos la morton; se antaŭ la Sinjoro mi mortos, mi vivos poreterne.

Maksimo diris: Auskultu min: oferu do, por ke – kiel mi diris – mi ne mortigu vin.

Julio respondis: Mi elektis morto por ĉi mondo, por ke poreterne mi vivu kun la sanktuloj.

Tiel guberniestro Maksimo donis la verdikton: Julio, kiu ne volis obei al la imperiestraj dekretoj, estu senkapigita.

4 Kiam oni kondukis lin al la kutima loko, ĉiuj kisadis lin. Sed sankta Julio diris: Ĉiu vidu, kun kiu intenco li kisas.

Sed certa Isihio, kristano kiu hazarde ĉeestis kiel soldato kaj devis gardi lin, diris al la sankta martiro: Mi petas vin, Julio, plenumu kun ĝojo vian intencon, kaj ricevu la kronon, kiun la Sinjoro promesis doni al tiuj, kiuj konfesas lin, kaj memoru pri mi, ĉar mi sekvos vin. De mi – mi petas – vi

ankaŭ bonvolu saluti la fraton Valentino, serviston de Dio, kiu per bona konfesado²⁹ jam antaŭiris nin al la Sinjoro.

Sed Julio kisis Isihion kaj diris: Rapidu, frato: venu. Viajn salutojn aŭskultu li mem, kiun vi lasas saluti de vi. Li transprenis de li la tukon, ligis per ĝi al si la okulojn, elstreĉis sian nukon kaj diris. Sinjoro Jesuo Kristo, pro kies nomo tion ĉi mi suferas, mi petas vin, ke vi bonvolu akcepti mian spiriton inter viaj sanktaj martiroj.

La servisto de la diablo frapis per la glavo, kaj finis la vivon de l' tre sankta martiro en nia Sinjoro Jesuo Kristo, al kiu estas honoro kaj gloro en la jarcentojn de l' jarcentoj. Amen.

²⁹ Baza senco de martiriĝo: esti ĝismorte atestanto, konfesanto pri Dio.